

Jean de La Fontaine,  
La Cigale et la Fourmi

La cigale, ayant chanté  
Tout l'été,  
Se trouva fort dépourvue  
Quand la bise fut venue.  
Pas un seul petit morceau  
De mouche ou de vermisseau  
Elle alla crier famine  
Chez la fourmi sa voisine,  
La priant de lui prêter  
Quelque grain pour subsister  
Jusqu'à la saison nouvelle  
«Je vous paierai, lui dit-elle,  
Avant l'oût, foi d'animal,  
Intérêt et principal .»  
La fourmi n'est pas prêteuse ;  
C'est là son moindre défaut  
«Que faisiez-vous au temps chaud?  
Dit-elle à cette emprunteuse.  
Nuit et jour à tout venant  
Je chantais, ne vous déplaise.  
- Vous chantiez? j'en suis fort aise.  
Eh bien : dansez maintenant.»

...

Jean de La Fontaine,  
La cikad' kaj la formik'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sonis dum somer' kantad'  
De cikad'.  
Kiam venis la jarfin'  
Sen proviz' ĝi trovis sin;  
Ĉar ne estis ie de  
Muš' aŭ verm' pecet', pro ve'  
Kaj malsat' ĝi turnis sin  
Al Formik', la najbarin',  
Ŝin petante pri paner';  
Ĉar grandegis la mizer'.  
“Ĝis la nova kant-sezon'  
Igos ja de mi redon'”  
Juris ĝi, “kaj pagos mi  
Interezon ĝis Junii!”  
La formiko, kiu vere  
Ne prundonon ŝatis tre,  
Diris: “Mi ĝin donos ne!  
Kion faris vi somere?” -  
“La pasantojn per muzik'  
Mi ĝojigis ĝis aŭtun’.”  
“Mi tre ĝojas, dancu nun!”  
Diris tiam la formik’.

...

Jean de La Fontaine,  
Die Grille und die Ameise

*tradukita de Wilhelm Ernst Dohm*

Grillchen, das den Sommer lang  
Zirpt' und sang,  
Litt nun, da der Winter droht',  
Harte Zeit und bittere Not:  
Nicht das kleinste Würmchen nur  
Und von Fliegen keine Spur!  
Und vor Hunger weinend leise,  
Schlich's zur Nachbarin Ameise,  
Fleht' sie an in ihrer Not,  
Ihr zu lehn ein Körnlein Brot,  
Bis der Sommer wiederkehre.  
“Glaub' mir,” sprach's, “auf Grillenehre,  
Vor dem Erntemond noch zahl'  
Zins ich dir und Kapital.”  
Emschen, das, wie manche lieben  
Leute das Verleihen hasst,  
Fragt die Borgerin: “Was hast  
Du im Sommer denn getrieben?” -  
“Tag und Nacht hab' ich ergötzt  
Durch mein Singen alle Leut'.”  
“Durch dein Singen? Sehr erfreut!  
Weīß du was? Dann tanze jetzt!”

...

Jean de La Fontaine,  
Cikado kaj formiko

*tradukita de Antoni Grabowski*

Kantis dum somer' sen fin'  
Cikadin'.  
Kiam frosta vento blovis  
Sen provizo ŝin ektrovis,  
Sen malgranda eĉ pecet'  
Da mušeto aŭ vermet';  
La malsato pelis ŝin  
Al najbara formikin'.  
Kaj ŝi petis kun insisto:  
“Donu grajnojn por ekzisto  
Ĝis la nova jar-sezon’.  
Mi vin pagos, laŭ ordon',  
En Aŭgust', pro best-honor',  
La procenton kun valor’.”  
Ke ne pekas formikino  
Per prunttemo, estas vere;  
“Kion faris vi somere?”  
Diris ŝi al pruntulino.  
—“Tage, nokte al venantoj,  
Ne mallaŭdu – kantis mi.”  
—“Kantis? – gaja jen meti’!  
Nun ekdancu post la kantoj!”

...

Verkinto de tiu ĉi Franca poemo estas  
JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 –  
†1695-04.12).

Arg-549-1103 (2010-08-07 13:53:59)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tekston el <http://www.lafontaine.net/lesFables/afficheFable.php?id=1>.

Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983.

Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)

Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en la Germanan de WILHELM ERNST DOHM (Geburtsname: Elias Levy, \*1819-05-24 – †1883-02-05).

Arg-549-1104 (2010-07-09 22:21:39)

Pri la tradukinto Wilhelm Ernst Dohm vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst\\_Dohm](http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Dohm). Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-germanigon en la libro "Jean de La Fontaine: Die Fabeln" (Gesamtausgabe in deutscher und französischer Sprache, Emil Vollmer-Verlag, Wiesbaden.)

Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).

Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en [http://www.babelmatrix.org/works/frLa\\_Fontaine,\\_Jean\\_de/\\_La\\_cigale\\_et\\_la\\_fourmi/eo/5026-Cikado\\_kaj\\_formiko](http://www.babelmatrix.org/works/frLa_Fontaine,_Jean_de/_La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko).

Ĝi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow <http://donh.best.uwh.net>.

Pri la tradukinto vidu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni\\_Grabowski](http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski). Vidu ankaŭ: [http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado\\_kaj\\_formiko](http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko).